

Heinrich Heine,
Teksista kanto

tradukita de Alfred Conzeth

Nenia larmeto en sombraj
okuloj,
Jen sidas teksistoj, mizeraj
povruloj;
Germana Praregno, mort-
tukon ni teksas,
Kaj en ĝin trioblan malbenon
ni plektas.
Ni teksas, ni teksas!

Malbenon al Dio, la blinda, la
surda,
Al kiu ni preĝis en kredo ab-
surda.
Ni vane esperis, ni vane pre-
dikis -
Li trompis simie, nin eĉ mi-
stifikis.
Ni teksas, ni teksas!

Malbenon al Reĝo, al reĝ' de
riĉuloj,
Ne vidas suferon de ni mize-
ruloj,
Li premas el ni ja la lastan
et-pundon
Kaj lasas mortigi nin kiel fi-
hundan.
Ni teksas, ni teksas!

Malbenon al nia Patrujo mal-
justa,
Jen kie prosperas nur trompo
embuska,
Jen kie ĉe putro nur morta
kaduko;
Germana Praregno, jen via
mort-tuko!
Ni teksas, ni teksas!

...

Heinrich Heine,
Teksista kanto

*tradukita de Manfredo Ratis-
lavo*

Ĉe siaj teksiloj la dentojn
grincante
Sidadas teksistoj jen, ne plo-
rante:
Ni teksas trioblan malbenon
por vi
En vian morttukon, Germa-
ni'.
Ni teksas, ni teksas!

Malbenon al tiu ĉi surda Dio,
Infane ni kredis je la religio.
Ja vane esperis, atendis ni,
Simiumis kaj mistifikis nin
Li.
Ni teksas, ni teksas!

Malbenon al tiu fireĝ' de l'
riĉuloj,
Kiu ne kompatis je ni mize-
ruloj,
Ĉantaĝas la lastajn groŝojn el
ni,
Kiel hundojn nin pafmortigi-
gas li.
Ni teksas, ni teksas!

Malbenon al tiu ĉi falsa pa-
trio,
Kie nur prosperas la koterio,
Kie estas rompata ĉiu juna
flor',³
Kie regas de l' putro la odor'
-
Ni teksas, ni teksas!

...

Heinrich Heine,
Die schlesischen Weber

Im düstern Auge keine Träne,
Sie sitzen am Webstuhl und flet-
schen die Zähne:
Deutschland, wir weben dein Lei-
chentuch,
Wir weben hinein den dreifachen
Fluch.
Wir weben, wir weben!

Ein Fluch dem Gotte, dem blind-
den, dem tauben,
Zu dem wir gebetet mit kindli-
chem Glauben.
Wir haben vergeblich gehofft und
geharret,
Er hat uns geäfft und gefoppt und
genarrt.
Wir weben, wir weben!

Ein Fluch dem König, dem König
der Reichen,
Den unser Elend nicht konnte er-
weichen,
Der uns den letzten Groschen er-
preßt
Und uns wie Hunde erschießen
läßt.
Wir weben, wir weben!

Ein Fluch dem falschen Vaterlan-
de,
Wo nur gedeihen Trug und Schan-
de,
Wo jede Blume früh geknickt,
Wo Fäulnis und Moder den Wurm
erquickt -
Wir weben, wir weben!

...

³aŭ: Kie frue rompatas ĉiu flor',

Navedo flugas kaj krakas teksil',	Das Schiffchen fliegt, der Webstuhl kracht,
Ni teksas senlace dum nokta trankvil' –	Wir weben emsig Tag und Nacht
Morttukon ni teksas, Germanujo, por vi, ⁴	-
Enteksas trioblan malbenon ni,	Altdeutschland, wir weben dein Leichentuch,
Ni teksas, ni teksas!	Wir weben hinein den dreifachen Fluch,
	Wir weben, wir weben!

*Traduko de la Germana poemo "Die schlesischen Weber" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de ALFRED CONZETH (*1913-12-08 – †1998-05-16).*

Arg-243-492 (2004-06-02 21:43:47)

Alfred Conzeth vivis en Mettmann ĉe la germana urbo Düsseldorf. Li estis profesia presisisto kaj korektisto ĉe la eldonejo Droste en Düsseldorf. Li mem eldonis Esperanto-broŝurojn kaj diversajn tradukojn kaj tradukis ankaŭ mem. Li estis dum multaj jaroj la eldonisto de la informilo de la Esperanto-Societo de Düsseldorf, la "Radsaltanto". [Laŭ informo el la libro "Esperanto - ein Ausweg aus Babylon? 95 Jahre Esperanto in Düsseldorf", eldonita en 2002 de Edeltraud kaj Max Hans-Jürgen Mattusch kunlabore kun la Esperanto-Societo Düsseldorf]

*Traduko de la Germana poemo "Die schlesischen Weber" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04).*

Arg-243-491 (2005-11-20 18:13:42)

Esperantigita de Manfred Ratislavo (Manfred Retzlaff) en 2001-04-08 laŭ la germanalingva teksto, kiu post la publikigo de la unua versio en la revuo "Vorwärts!" (= "Antaŭen!"), eldonita de germanaj fuĝintoj, estis diskonigita en Germanio sur flugfolioj. En tiu flugfolia versio la poemo havis la titolon "Weberlied" (= "Teksista kanto"). [Laŭ interreta informo de l' 27.05.04 de la Instituto Heinrich Heine, Düsseldorf, s-ino Marianne Tilch.]

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17).*

Arg-243-490 (2005-11-20 17:47:50)

Deutschsprachige Fassung des Gedichtes, das ursprünglich mit der Überschrift „Die armen Weber“ in der deutschen Emigrantenzeitschrift „Vorwärts!“ am 10.07.1844 in Paris veröffentlicht worden war. In dieser Flugblattfassung hatte das Gedicht die Überschrift „Weberlied“. [Laut Netznachricht vom 27.05.04 des Heinrich-Heine-Instituts Düsseldorf, Frau Marianne Tilch.]

⁴aŭ: Morttukon, ni teksas por vi, Germani', Trioblan malbenon enteksas ni.